pdf. iompostiom .net 001

internacia reta printebla gazeteto – kompostita el retaj fontoj – por sur la tablo en esperantaj kluboj

Tutmonde

Informoj el la reto: Tonjo Blair rezignos je la 27-a de junio. Jen vortoj kaj opinio

Legu la plenan artikolon en raporto.info

Mi anoncas rezignon el mia gvidado je la Laborista Partio. Je la 27-a de junio mi prezentos mian rezignon al Reĝino.

Mi petas ke vi akceptu: mane sur kore: mi faris kion mi pensis esti korekte. Mi eble povis esti erara… Mi faris kion mi pensis esti korekta por nia lando.

Mi estis tre feliĉa kaj tre benita. Tiu ĉi lando estas tre benata nacio. Britoj estas specialaj, la mondo scias ĝin, ene de nia pli internaj pensoj ni scias ĝin. Tiu ĉi estas la plej granda nacio sur tero. Estis honore servi ĝin.

Movade

Reinhard Selten parolis pri Esperanto en la Eŭropa Parlamento

Legu la plenan artikolon en Libera Folio

Pro la Tago de Eŭropo la 9-an de majo, dek tri nobelpremiitoj estis invititaj en la Eŭropan Parlamenton. Inter ili troviĝis la esperantisto Reinhard Selten. Li estis prezentita de la prezidanto de la Parlamento kiel esperantisto, kaj li mem levis la demandon pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto dum sia parolado.

Laŭ la oficiala komuniko de EU Reinhard Selten emfazis la rapidan ekonomian integriĝon de Eŭropo en la lastaj kvindek jaroj kaj diris ke la sukceso de la mona unuiĝo estis "io neimagebla". Grandparte tio laŭ li ŝuldiĝas al "la sendependeco kaj engaĝiĝo de la Eŭropa Centra Banko".

Junule

Ĉi-jara IJK en Hanojo

La pedagoga universitato de Fremdaj Lingvoj estis selektita kiel la kongresejo por IJK. Ĝi situas proksime de la internacia flughaveno. Estas tre konvena por kongresanoj atingi tien per rekta aŭtobuso el flughaveno dum 30 minutoj. La universitato posedas 2 grandajn konferencajn salonojn (400 kaj 700 seĝoj); kaj pli ol 30 malgrandajn salonojn (30-60 seĝoj). En la universitato troviĝas interreto-ĉambro, kaj aliaj bezonataj ĉambroj. Ĉirkaŭ la universitato troviĝas multaj bazaroj, superbazaroj, manĝejoj, drinkejoj kaj vendejoj de ĉiuj aĵoj kaj ankaŭ multaj grandaj kaj malgrandaj hoteloj.

Opinie

Afiŝo de Amuzulo en esperanto.livejournal.com:

Ĉu vi volas aliĝi al la verda armeo?
http://cxiesrevujino.iespana.es/cxies1.pdf

Vidu esperanto.livejournal.com por komentoj

El la forumo de amikumu.com

Ĉiuj diras ke Esperanto estas facila. Sed vidu, multaj homoj ne uzas ĝin bone (ankaŭ mi). Estas tiel ke nevidinde estas kelke da malfacilaj aferoj en Eepearnto.
Kion vi pensas? Ĉu vi iam pensas ke io en Esperanto estas malfacila? Do kio estas la plej malfacila parto de Esperanto?

Razen Manandhar (el Nepalo)